



LA INFORMILO



informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

ELDONISTO: ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCO

EDITEUR: Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto

Maison des Jeunes et de la Culture
27, rue de la République, 54000 - NANCY - Fr.


PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

trimestriel

nouvelle série

43

1er trimestre 1976



abonnement

un an: 7 F

le n°: 1,75 F

(1 jaro : 7 FF aŭ 6
internaciaj kuponoj)

NTO ... FLASH... ESPERANTO... FLASH...

★ LES GRANDS RENDEZ-VOUS 1976



„Karavano al la Suno”

”caravane vers le soleil”

C'est en effet en GRECE que se tiendra pour la première fois le grand Congrès Universel d'Espéranto de UEA. Invités par l'Association Hellénique plus de 2000 espérantophones d'une cinquantaine de pays vont se retrouver sous le ciel bleu de la Méditerranée pour cette manifestation internationale, placée sous le haut-patronage de M. Georgios RALIS, premier ministre. L'Union Française pour l'Espéranto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS, organise à cette occasion un voyage par avion vers Athènes.

ET VOICI D'AUTRES CONGRES... DANS LE MONDE.


— LE 49ème CONGRES DE S.A.T., seconde grande organisation mondiale espérantiste, se tiendra à GOTENBURG en Suède. Un premier Congrès de la même Association avait déjà eu lieu dans cette ville en 1928.

— LE 60ème CONGRES D'ESPERANTO BRITANNIQUE aura pour cadre la ville de CHESTER, du 28 au 31 mai 1976.

— LE 63ème CONGRES D'ESPERANTO JAPONAIS aura lieu à NAGOYA les 21 et 22 août.

... ET EN FRANCE.

— LE CONGRES NATIONAL DE L'UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO se tiendra du 16 au 20 avril à LA GRANDE-MOTTE. En plus des travaux habituels et du banquet traditionnel qui réunira tous les Congressistes, deux excursions sur la côte et dans l'arrière-pays sont ins-



crites au programme. Tous renseignements auprès de UFE.

EPINAL, "cité des images", accueillera le Congrès annuel de la FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO. Les 3 et 4 avril 1976, les espérantophones de l'Est de la France se retrouveront pour débattre de leurs problèmes et organiser leur action future. Au programme: cours accéléré d'espéranto, examens, films sonores, reportages, exposition, visite de musée.

INVITATION ET BULLETIN D'ADHESION AU CONGRES DANS CE MEME NUMERO.

≪ BORDEAUX sera le rendez-vous des "Travailleurs Espérantophones des Pays de Langue Française" (SAT-Amikaro) les 17, 18 et 19 avril 1976. Parmi les originalités du programme, citons "le buffet-surprise", où seront dégustées les spécialités de toutes les régions de France, apportées par les congressistes et un débat de haute tenue sur la régionalisation.

≪ L'ESPERANTO ET LES J.O. Le Comité Olympique vient de demander aux pratiquants de l'espéranto, connaissant également l'anglais et le français, de bien vouloir se faire inscrire comme interprète pour la seconde quinzaine de juillet.

L'ESPERANTO ET L'ONU. Un groupe de travail vient de se créer à New-York, dans le but de mettre au point une action concertée auprès des services de l'O.N.U. Le conseiller technique en est M. Ralph HARRY, ambassadeur d'Australie auprès des Nations-Unies.

≪ LA TELEVISION AU SERVICE DE L'ESPERANTO. La télévision slovaque diffuse à son tour un cours d'espéranto en 17 séquences, depuis le 15 octobre. Chaque leçon hebdomadaire, d'une durée d'une 1/2 h., est interprétée par des acteurs professionnels. La télévision de ZAGREB a présenté durant l'été 6 programmes sur la langue internationale; dans le même temps plus de 100 articles sont parus dans la presse yougoslave.

LES MEDECINS S'INTERESSENT A L'ESPERANTO. A l'issue de leur apprentissage, 10 médecins de Šumen (Bulgarie), vont entrer en contact avec leurs collègues d'autres pays.

≪ L'INSTITUT DE PEDAGOGIE DE CIBERNETIQUE de Paderborn (RFA) recherche des professeurs et des mathématiciens pour enseigner l'espéranto dans le cadre des travaux envisagés.

LA FIRME BERLINOISE DE TRAVAIL TEMPORAIRE utilise également l'espéranto auprès de 6 autres langues pour assurer son service de recrutement.

≪ UNE SUBVENTION de 30 000 couronnes a été octroyée par le gouvernement danois à une troupe internationale de marionnettes de Bulgarie, spécialisée dans les spectacles en espéranto.


UN NOUVEAU DISQUE EN ESPERANTO. Il évoque, par la voix de deux chanteuses finlandaises, trois célèbres histoires d'amour qui ont eu pour cadre l'Esthonie, la Finlande ... et l'Ancien Testament (danse de Shulamidine).

≪ TROIS NOUVELLES RUES DE FRANCFORT dédiées à l'espéranto. "Espéranto, Zamenhof, Barthel (pionnier local)", tels sont les noms que la municipalité vient de donner à trois rues de la ville. Plus de 300 rues et places dans le monde témoignent ainsi de la vitalité de l'espéranto.

UN NOUVEAU RESTAURANT "ESPERANTO" à Slančev Briag (Bulgarie) peut servir 800 clients dans ses salles d'accueil. Quant aux espérantophones locaux de TREVES, ils pourront désormais se retrouver au 87 de la Saarstrat, siège d'un CAFE et d'une DISCOTHEQUE "ESPERANTO".

≪ LA PROPOSITION DE LOI FRANCAISE sur l'enseignement de l'espéranto. A la fin de janvier 209 députés avaient déjà apporté leur soutien à l'initiative de leurs collègues du groupe socialiste. Parmi les nouveaux appuis on compte 52 UDR, 44 RI, 8 PC, 5 Réf. et 4 non-inscrits.

VOKAS VIN
AL LA...



EPINAL
"urbo de l'bildoj"
cité des images



VOUS CONVIE
AU...

★ **35.a KONGRESO**
DE L'ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

→ sabaton la 3-an kaj dimanĉon la 4-an ←
...de aprilo 1976

— La Kongreso de la Orient-Franca Kultura Federacio por Esperanto okazos ĉi-jare en "INTER-JEUNES", junuldomo, 9 strato Charlet en EPINAL.

Al nia kutima programo ni deziras aldoni inter ceteraj novaĵoj laboran sed amikan staĝon cele plibonigon de nia lingvo-kono kaj ankaŭ film-vesperon, kiu kondukos nin de Nov-Zelando kaj Aŭstralio al Orient-Germanio kun malgranda halto en la uzinoj FIAT ... pere de tri son-kolor-filmoj en Esperanto.

Ni tutevidente kalkulas pri la ĉeesto de ĉiuj samideanoj el Orient-Francio kaj de aliaj membroj de l'najbaraj Federacioj, ne forgesante niajn esperanto-parolantojn el la alia Rejn-bordo.

— Le Congrès de la Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto aura lieu cette année à "INTER-JEUNES", Maison des Jeunes, 9 rue Charlet à EPINAL (88), les samedi 3 et dimanche 4 avril 1976.

A notre programme habituel nous désirons ajouter, entre autres innovations, un stage studieux mais amical dans le but d'améliorer notre connaissance de la langue puis une soirée-cinéma qui nous emmènera de Nouvelle-Zélande et d'Australie en Allemagne de l'Est, avec une petite escale aux usines FIAT... soit trois films en couleurs et sonorisés (bien sûr!) en espéranto.

Il va de soi que nous espérons la présence de tous nos "samideanoj" de la région de l'Est ainsi que celle d'autres membres des Fédérations voisines, sans oublier nos amis espérantophones d'au-delà du Rhin.

nia programo

SABATON, 3-an de aprilo 1976

- 14-a Akcepto
- 15-a Staĝo
- 19-a Komuna vespermanĝo
- 20-a 1/2 Kolor-son-filmoj en E°

SAMEDI, 3 avril 1976

- 14h Accueil
- 15h Stage
- 19h Dîner en commun
- 20h1/2 Films sonorisés en espéranto

DIMANĈON, 4-an de aprilo

9-a A/ Ĝenerala kunveno de la Federacio

- raporto de la Sekretario
 - raporto de la Kasisto
 - raporto de la Respondeculoj
- el diversaj urboj

DIMANCHE, 4 avril

9h A/ Assemblée Générale de la Fédération

- rapport du Secrétaire
- rapport du Trésorier
- rapport des Responsables des diverses villes

- debatoj pri tiuj diversaj raportoj
- renovigo de unu triono de la Federacia Komitato

B/ Preparo de la Nacia Kongreso en La Grande Motte

- Studo de la jar-raportoj kaj de aliaj tekstoj
- Proponoj, rezolucioj, voĉdonoj por la nacia kongreso
- Elekto de nia delegito en La Grande Motte

12-a 1/2 Komuna tag-manĝo

14-a Pluraj eblecoj:

- vizito de muzeo
- tra "multfaceta" centra Eŭropo (diapoz.)
- Komitata kunveno kaj elekto de la nova estraro
- ekzamenoj unua- kaj dua-gradaj

17-a 1/2 Disiĝo...

- débats concernant ces divers rapports
- renouvellement d'un tiers du Comité Fédéral

B/ Préparation du Congrès National de La Grande Motte

- étude des rapports annuels et autres textes
- Propositions, résolutions, votes pour le Congrès National
- élection de notre délégué à L.G.M.

12h 30 Déjeuner en commun

14h Plusieurs possibilités:

- visite de musée
- à travers l'Europe Centrale aux "multiples facettes" (diaposit.)
- Réunion du Comité et élection du nouveau Bureau
- examens du 1er et du 2ème degré

17h30 Séparation...

Dum la tuta kongreso okazos Esperanto -Ekspozicio kaj estos instalita libro-stando, kie diversaj E^o-libroj estos akireblaj.



Une exposition se tiendra durant tout le Congrès ainsi qu'un stand où l'on pourra acquérir divers ouvrages sur l'espéranto.





UTILAJ ADRESOJ:

S-r^o BERGEROT, 22 rue Varroy, CHANTRAINE, 88000 EPINAL (Fr.)

S-r^o DEGRELLE, 11 cours Léopold, 54042 NANCY CEDEX

S-r^o COLNOT, 15 rue Lavaux, 54520 LAXOU

*** kiamaniere atingi la kongresejon**
comment se rendre au lieu du congrès ?



"Inter-Jeunes", troviĝas strato Charlet, n^o 9, tute proksime de la stacidomo

"Inter-Jeunes", 9 rue Charlet, se trouve tout près de la gare SNCF.

ALIGO AL LA KONGRESO

ADHESION AU CONGRES FEDERAL

(resendota kiel eble plej rapide, kaj ne pli malfrue ol la 21-an de marto 1976, al
à renvoyer le plus vite possible et au plus tard le 21 mars 1976, à l'adresse suivante

S-r^o BERGEROT, 22 rue Varroy, CHANTRAINE, 88000 EPINAL, kiu respondecas pri la K^o
responsable de l'organisation matérielle du Congrès.)

S-r^o, S-in^o, F-in^o *
M., Mme, Mile

Adreso
Adresse

Mi alvenos sabate / dimanĉe je la horo, per
J'arriverai samedi / dimanche à heures, par

Mi rezervas manĝojn: sabate vespere por personoj kaj infanoj
Je réserve les repas: samedi soir pour personnes et enfants

dimanĉe tagmeze por personoj kaj infanoj
dimanche midi pour personnes et enfants

Mi petas rezervon de 1-lita(j) hotel-ĉambro(j) je F* (la prezoj kuŝas ĉi-sube)
Je désire la réservation de chambre(s) à un lit, au prix de F (voir prix ci-dessous)

2-lita(j) hotel-ĉambro(j) je F*
de chambre(s) à deux lits, au prix de F

Mi deziras dormi en "Inter-Jeunes"
Je désire dormir à "Inter-Jeunes"

* (bonvolu forstrekigi netaŭgaĵojn)
veuillez rayer ce qui ne convient pas)

ADHESION aligo al la staĝo AU STAGE

(resendota al S-r^o DEGRELLE, 11 cours Leopold, 54042 NANCY CEDEX, antaŭ la 21/3/76)
à renvoyer à -id- avant le -id-

Mi partoprenos al kurso A B C (1)
Je participerai au cours A B C

Nomo kaj adres (:

A unuagrada B duagrada C triagrada
1er degré 2ème degré 3ème degré

Mi mendas la jenajn verkojn
Je commande les ouvrages suivants

Kurso A: "Junulkurso" 12 F Suplemento 3 F Diskoj 18 F

Kurso B: "Por la praktikantoj" 12 F

Kurso C: "Paŝoj al plena posedo" 20 F

Dictionnaire pratique: 25 F (por ĉiuj - pour tous)

Mi deziras trapasi ekzamenon unua-gradan duogradan
Je désire passer un examen du 1er degré 2ème degré

* Bonvolu krucumi laŭdekte en la eta kvadrato
Veuillez cocher en croix dans le petit carré, selon l'option choisie

DIVERSAJ PREZOJ:

Kotizo 5 F po familio
en INTER-JEUNES

Nokto kaj maten-manĝo 16 F
Tagmanĝo (por ĉiuj kongresanoj) 12 F
Vespermanĝo 12 F

en HOTELOJ

"des Vosges"	unulita ĉambro	33 F	
	dulita	42 F	
"Bristol"	dulita ĉambro	36 F	
	kun banejo	44 F	
"Mouton blanc"	dulita	41 F	
	unulita kun b.	61 F	
"Moderne" (1)	unulita	26 F	kaj 30 F
	dulita	34 F	et 39 F
"Pomme d'or"	unulita (2 pers.)	30 F	
	dulita (2 pers.)	50 F	

(1) tiu hotelo petas antaŭpagon

PRIX DIVERS:

cotisation 5 F par famille
à INTER-JEUNES

nuit et petit déjeuner
déjeuner (pour tous les congrès.)
dîner

chambre à un lit
" à 2 lits

à un lit
avec bain

à 2 lits
à un lit avec bain

cet hôtel demande des ahres

AKTIVECA RAPORTO POR LA JARO 1974-1975

Oni povas diri, ke ĉi-tiu jaro estis sufiĉe kontentiga por nia Federacio; ariĝis kongresanoj, okazis parolaj kursoj, funkciis perkoresponda kurso, kunvenis la grupoj, estis organizita staĝo por plibonigo de la parola lingvo, bonege sukcesis pluraj personoj en diversnivelaĵaj ekzamenoj, samnombro restis la federacianaro.

— PRI LA KONGRESO, MEMORU:

Nia ĉi-jara kongreso okazis en la Junuldomo de Staffelfelden, kolektinte 45 personojn.

— PRI LA PERKORESPONDA KURSO, ATENTU:

Aliĝis la kurson: 60 Tute ne laboris: 15 Nur eklaboris: 17 ...ĝis la 5a leciono: 11, ĝis la 10a: 5, preskaŭ finis: 2, finlernis: 10.

Kompare kun la antaŭa jaro estas plibonigo. Estas ankaŭ substrekinda la fakto, ke la junuloj interesiĝas al la kursoj.

— PRI LA GRUPOJ, AUSKULTU:

1/ - BAR-le-DUC: La membroj sufiĉe fidele ĉeestas la monatan kunvenon; ses gelernantoj finlernis la publikan kurson kaj enskribiĝis por la dua-grada. Do ĉi-jare okazis du elementaj kursoj kaj unu duagrada.

2/ - EPINAL: Loko de nia Kongreso.

3/ - MULHOUSE: La grupo kunvenas unufoje semajne, akceptis eksterlandanojn el Svisio kaj Germanio, rilatas kun la Bazela grupo kaj okazigas dimanĉajn renkontiĝojn kaj vojaĝojn.

4/ - STRASBOURG: La Kultura Centro kunvenas regule la 2an mardon de ĉiu monato, 1 pl. Mérian. Ĝi festis la Zamenhoh-tagon la 9an de decembro per prelegoj kaj mendo de E^o-libroj. Nun funkcias perkoresponda kurso kun ĝis nun du lernantoj. Oni speciale propagandas en la skoltaĵoj kaj fervojistaĵoj rondoj, ĉar iliaĵoj anoj plej ofte vojaĝas eksterlanden.

5/ - NANCIO: La nombro de la membroj altiĝis ĝis 12, okazis kelkaj neregulaj kunvenoj, akceptiĝis la UEA-delegito en TOKIO, estas rilatoj kun la Kanazawa grupo, estas gvidataĵoj du parolaj unuagradaĵoj kursoj, estis senditaj pli ol 40 komunikaĵoj kaj informoj al la regiona gazetaro. Plie ni fieras pri la granda sukceso de la decembra staĝo.

6/ - St-DIE: La E^oklubo konsistas el 8 membroj, kiuj daŭrigas la lernadon de l'"Esp^{er}anto Vivant". La grupestro, S-r^o GODART, sendis dum julio leteron pri la legpropono al la deputitoj de Vogezoj. Nenia respondo ĝis nun.

PRI LA STAĜO, ĜOJU:

Ĝi okazis la 20an kaj 21an de decembro. Ĝi konsistis el tri diversnivelaj kursoj, kies celo estis: paroligi la gekursanojn. Partoprenis 32 personoj, ĉiuj sciemaj. Kia plezuro vidi svarmi tiun aron da gelernantoj. La kurslibroj titoliĝis: Junulkurso, Por la praktikantoj, Paŝoj al plena posedo. Travivaĵo rekomendinda, sendube rekomencinda.

PRI LA LEGPROPONO FAVORA AL ESPERANTO, NE MALESPERU:

Ĝis nun 4 deputitoj konsentis pli malpli varme favori: eta komenco, sed tamen komenco. Ni memorigas vin, ke je la fino de januaro, 209 deputitoj jam sciigis sian apogon al la projekto.

PRI LA EKZAMENOJ, GRATULU:

Estiĝis pluraj ekzamenperiodoj.

Trafis la ekzamenon	Atesto pri lernado	12
	Atesto pri praktika lernado	2
	Atesto pri kapableco	1

PRI NIA NOMBRO, AGADU: Ni estas nun 110.... KONKLUDO, KLOPODU:

Estus dezirinde, ke la agadnivelo kresku laŭ la altiĝnivelo de la lingvoscio, despli ke nun perkoresponda dua-grada kurso denove bone funkcias, ĉar ne plu mankas la libroj.

Ĉiuj estas vokataj al agado. Ni laboru kaj esperu!

La Sekretario: R. DEGRELLE

FINANCA RAPORTO POR LA
JARO 1975

ENSPEZOJ:

1 kotizo 1974	8 F
106 kotizoj 1975	5580
1 kotizo al GEE	5
Donacoj (laŭ aper. list.)	676
Abonoj al E- ^o Revuoj	319
Vendo de libroj	72
Diversaĵoj	88,23
	<hr/> 6748,23

ELSPEZOJ:

Kotizo al UFE (por 1974)	7 F
Kotizoj al UFE 1975	5162
KOTIZOJ AL GEE	72
Kotizoj al JEFO	46
Afrankoj kaj sekretariaĵoj	424,29
Propagando	119,60
Perado de abonoj	319
Aĉeto de libroj	97,50
	<hr/> 6247,39

BILANCO:

enspezoj:	6748,23
elspezoj:	6247,39
profito	<hr/> 500,80

ELDONADO DE LA INFORMILO:

enspezoj:		elspezoj:	
5 abonoj por 1974	25	Send-kostoj por Inf. 8	27,60
145 abonoj por 1975	871,80	Multobligo por Inf. 9	134
	<hr/> 896,80	10	154,50
		11	82,50
		12	102,50

BILANCO:		Send-kostoj por Inf.	9	85,85
enspezoj:	896,80		10	94,50
elspezoj:	870,80		11	88,80
			12	100,55
	26,00			870,80

REZULTO:

En la kaso je la 31/12/74	566,66 F
Profito por 1975	500,84
Profito "Informilo"	26
En la kaso je la 31/12/75	1093,50

La Kasisto: A. GROSSMANN

GRAVA ATENTIGO: Ĉiujn tekstojn por la "INFORMILO N° 14" vi sendu al la redaktoro, P. DENIS 5, chemin de blamecourt, 55000 BAR-le-DUC, ANTAU LA 15-a de APRILLO 1976.

7-A KULTURA SEMAJNFINO EN SARLANDO:

La 7-a Kultura Semajnfino okazos denove en la Kastelo "Junkerwald", de la 7-a ĝis la 9-a de majo 1976. Okazos kursoj A, B, C. Kurson B versajne denove gvidos Jean THIERRY (tio faciligos partoprenon de franc-lingvanoj), kurson C gvidos Fernando de Diego (Zaragoza) pri E-^o traduk-arto.

Por pli detalaj informoj kaj aliĝoj, turnu vin al S.E.L., Franz-Schubert-Strasse 26,
D 6602 DUDWEILER Allemagne Fédérale

RENOVIGO DE LA KOMITATO: DE LA ORIENT-FRANCA FEDERACIO:

La mandato de la 4 jenaj komitatanoj finiĝas: S-roj COLNOT, CUENE, DURAND, ZIPFEL. Ili bonvolu anonci, ĉu ili kandidatiĝos denove aŭ ne, ĉu pere de la aliĝilo al la kongreso ĉu rekte al la prezidanto, prefere antaŭ la kongres-tago.

KOREKTU!... La jenaj ciferoj aperintaj en "LA INFORMILO" n° 12 ŝanĝiĝis por 1976:

"KONTAKTO" abono:	23 F	(anstataŭ 22 F)
"Kulturaj Kajeroj":	25 F	" 15
"Scienca Revuo":	25 F	" 23
"Sennaciulo":	50 F	" 44
"SAT-Amikaro":	30F	" 20

Krome, "NORDA PRISMO" ne plu aperas. Ĝin anstataŭas "Literatura Foiro" (abono 14 F)

Ni bedaŭru, ke ni estas informitaj pri la ŝanĝoj tro malfrue por la aperdato de nia kotiz- kaj abon-tabelo, aperanta principe ĉiujare dum oktobro por la sekvanta lern-jaro.

... ni ankaŭ sciigas, ke por la jaro 1976, la Kultura Centro de Strasbourg altigis la kotizon por ties membroj: nun 10 F jare, pagendaj al "CENTRE CULTUREL ESPERANTO", CCP 499-17 STRASBOURG (la kasistino estas S-in^o Madeleine STAHLBERGER, 17 rue de Lampertheim, 67800 BISCHHEIM.

LA VIVO DE NIAJ MEMBROJ: NIAJ ĜOJOJ...

- Geedziĝoj - Diana DENIS, filino de nia redaktoro Pol DENIS, edziniĝis la 27-an de decembro en Rochefort-sur-Mer kun S-r^o Guy ANDRE.
- Nia amiko Roland KUBLER edziĝis la 24an de decembro en Munchouse (68749) kun F-in^o Marguerite GANTNER.

Al la junaj geedzoj ni gratulas kaj deziras multe da feliĉo.